


LA LAMPIRO

59-a jaro n-ro 154 2018:6

La dimensioj de la Universo kaj la Homa Menso

0, 1, 1,
2, 3, 5,
8, 13,
21, 34,
55, 89,
144,
233,
377,
610,
987,
1597,
2584,
4181,
6765,
10946,
17711,
28657,
46368,
75025,
121393,
196418,
317811,

Nia percepto
influata de
nia
kalkulkapablo



www.easp.org.br/butiko

| **Libroservo**
| **de easp**

easp

81-a jaro

n-ro 154 2018:6

Propra sidejo
Rua Faustolo,
124 - Água Branca
05041-000 São Paulo,
SP - Brazilo
Telefonnumero:
(11) 3862-1183
easp.org.br
contato@easp.org.br

Jarkotizo por 2019

Simpla Membro R\$ 150,00
Subtena Membro R\$ 300,00
Ŝtatinterna Membro R\$ 75,00

Deĵoroj:

merkredo: 10h – 16h;
ĵaŭde kaj vendredo:
13h – 17h; sabate: 9h – 13h.

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana

(psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Sajjad Dashti Nezhad

Revizianto: Paulo Sérgio Viana, José

Roberto Tenorio

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins Coelho

Vicprezidanto: Marcos Zlotovich

1-a Sekretariino: Anna Lobo de Carvalho

2-a Sekretariino: Sidnéa da Conceição
Beall

1-a Kasisto: José Roberto Tenorio

2-a Kasistino: Vakas

Propaganda Direktorino: Cristina C. de
Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo

Branco kaj Aparecida de Souza Araújo

Anstataŭantoj

José Mauro Progiante kaj José Martins
Coelho

La redaktanto ne respondecas

pri la subskribitaj artikoloj



ENHAVO

6 La Trajno

8 Poezio Surbloge Loĝas

14 Granda Fiŝo kaj Begonio

15 ESPERANTISTOJ RENKONTIĜAS EN
LA PARAIBA VALO

16 Ĝenerala eseo pri Okcidentaj Oceaniaj
Religioj

19 Bianca (Tradukado)

20 La dimensioj de la Universo
kaj la Homa Menso

21 MI VOLAS ESTI SUBAKVISTO

23 LINGVAJ RESPONDOJ DE
FRANCISCO WECHSLER

25 LA PRUDENTO NE REĜAS,
TAMEN ĜI REGAS

26 Kelkaj poeziaj pripensoj

27 “Ha, Karmela!”

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Finiĝas unu plia jaro, kaj ĉi tiu 2018 ne estis facila jaro. Ni plu laboris, sed konfesinde, la rezultoj restis sub nia espero. Ni tamen sukcesis okazigi belan kongreson en la urbo Atibaia, ni aperigas nian revuon kun akceptinda reguleco, nia butikoj plu funkcias tute bone, nia sidejo plu regule restis malfermita al la membroj. Nia kongreso tamen okazis kun neordinare malmultaj aliĝintoj; nia revuo foj-foje lamis koncerne akuratecon, nia butikoj ricevis relative malmultajn mendojn kaj aĉetojn; kaj nia sidejo ankoraŭ atendas viziton de multaj anoj, kiuj de longe ne aperas tie. Kaj kiel plej bedaŭrindan fiaskon ni devas konfesi, ke la informado pri nia movado al la ekstera publiko plu restas farenda en multe pli granda kvanto. La kaŭzoj de tiaj mankoj ĉiuj vi konas: mankas homfortoj.

Tamen, ni postvivos ĉi tiun malfacilan jaron plenaj je fido. Ni alvokas bonvolemajn homojn, kiuj kredas, ke Esperanto estas apoginda idealo kaj ke EASP povas kreski kaj en la proksima jaro repreni sian historian laboron por Esperanto en nia ŝtato. Por tio ni varmkore invitas ĉiujn EASP-anojn: venu al ni! Helpu nin! Kunlaboru kun ni!

Al la grupo de fidelaj laborantoj, kiuj dum 2018 konservis sian kontribuon al la funkciado de nia asocio, ni lasu nian plej fervoran dankon. Al ili ni multe ŝuldas.

Al ĉiuj ni deziras feliĉan, fruktodonan Novan Jaron!

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Karaj legantoj:

Lanĉante ĉi tiun lastan numeron de La Lampiro en 2018, venas al ni pluraj konsideroj. Unue, ni danku. Al ĉiuj verkemuloj, kiuj dum la jaro regule kontribuis per siaj tekstoj. Pruvas ilian valoron diversaj esprimoj de kontenteco, kiujn ni ricevis de legantoj, en kaj ekster nia lando. Apartan dankon ni esprimu al la estrarano de EASP, José Roberto Tenório, kiu brile helpis en la grafika aranĝo kaj reviziado de la materialo. Same al nia irana samideano Saggad Dashti, kiu bele kontribuis per grafika aranĝo por la lastaj numeroj. Koran dankon!

Al la EASP-anoj kaj amikoj de nia asocio, ni ripetas: dum 2019, verku pri viaj pensoj kaj sentoj, verku pri la Esperanta kulturo kaj pri aliaj temoj de ĝenerala intereso. Ni estas certaj, ke vi havas multon por skribi. Sendu al ni viajn produktaĵojn!

Al la legantoj, ni dankas por la apogo kaj invitas al kritikoj, opinioj kaj proponoj. Nia tradicia revuo plu devas aperi, en 2019!

Feliĉan Novjaron!

La trajno

Dirce Sales

Ĉar mi bezonis interrompi la vojaĝon por atendi alian trajnon, kiu ankoraŭ iom malfruos, mi sidiĝis en la stacido-mo kaj decidis legi por eviti ĝin.

Do mi prenis el la mansako tre interesan libron, kiun amikino mia kunportis el la Universala Kongreso de Esperanto por mi: Kalevala.

Kaj mi plonĝis en la paĝojn de tiu kurioza historio, kiu per versoj rakontas pri la finna mitologio, kiu kaptis mian tutan intereson kaj atenton.

Kiam finfine la trajno alproksimiĝis, mi iom distre, laŭiris la eraran direkton kaj eniris en la veturilon, kiu lasis min tute ekster la realo...

Mi, kiu surmetis streĉitan ĝinzon, mallongetan jakon, altajn sandalojn, portis pendigitan tornistran kaj uzis la hararon malligita kaj nekombita, kiel ĉiam, certe fariĝis la plej stranga homo en tiu vagono, kie vojaĝantoj sin vestis laŭ la klasika kutimo de la 19-a jarcento!

Mi tuj konkludis, ke tiu afero celis al ia teatraĵa scenejo aŭ al ia filmo kaj mi jam pretiĝis por eliri, kiam...

Sur unu el la benkoj, certa paro kaptis mian tutan atenton!

-Dio mia! Certe mi sonĝas!

Li, laŭ la kutimo de sia epoko, stariĝis, kaj salutis min per diskreta kapmovo.

-Mi ne kredas! Mi ne kredas... Doktoro Zamenhof?!

-Nur Zamenhof, diris li, afable etend-

ante al mi la manon.

-Pardonu mian emociion, Majstro. Ĉi-momente eĉ paroli estas malfacile!

-Trankviliĝu, sinjorino. El kie ni konas nin reciproke?

-Bone, mia kono pri vi devenas de Esperanto, sed renkonti vin kaj interparoli kun vi, jen afero, kiun mi neniam povus imagi, supozu, atendi dum mia tuta vivo!


-Sed mi estas ordinara homo. Tia surprizo ne pravas, konkludis li sen ajna afekto.

-Tion vi pensas! Mi kredas, ke vi ne imagas la revolucion, kiun via invento kaŭzis en la mondo!

Tion mi diris tremante kaj preskaŭ senspire.

-Esperanto konektas nin ĉiutage kaj ebligas la komunikiĝon de ĉiuj personoj el la kvin kontinentoj sen bezono de tradukistoj! Ĉu vi kredas?! Estas io tute magia!

Klara do, per delikata gesto, surmetis



la etan manon sur la manon de sia edzo, kiu ĉirkaŭprenis ŝin tenere.

-Vi estas konata en la tuta mondo! Ni estas multaj, dank' al Dio kaj al via boneco, D-ro Zamenhof, lasi tiun nekalkuleblan trezoron por ĉiuj ni.

-Estas mi kaj mia edzino, kiuj dankas!

-Ho, sinjorino Klara, pardonu min! Kia honto! Mi ne vin salutis... Mi sentas min konfuza pro tiu renkonto absolute ne atendita de mi!

-Ne gravas, diris ŝi ridetante, kaj afable etendante al mi la manon, resalute.

-Kiam mi pensas pri la kvanto da personoj, kiuj senĉese kaj senlace laboras favore al Esperanto, kiuj fervore dezirus ĝui renkonton similan,

interparoli kun vi, raporti al vi pri la sukceso de via idealo... Kaj mi kiu tamen vivas tiun sperton, ke mi estas antaŭ vi, kvankam ne sukcesas organizi mian propran penson... Mi ne scias ĉu mi tremas pro. OO OOmanko de kohero aŭ pro la timo fali.

Klara do bonkore kaj simpatie invitis min sidiĝi apud ŝi kaj nia amema doktoro, proponis al mi glason da

akvo kaj ankoraŭ konsilis min trinki malrapide, kvazaŭ mi englutus ian medikamenton.

Kaj ni interparoladis dum multe da tempo...

Raporti tion, kion ni diris certe mi ne kapablus, sed subite venis al mi ideo: peti ilian permeson foti tiun historian kaj neforgeseblan renkonton. Kaj mi ricevis tiun permeson! Kia amema paro!

Ha, nedirebla feliĉo! Mi tuj malfermis la tornistron, prenis la porteblan telefonon kaj... vi ne kredos!

La benata aparato estis absolute senŝarĝa...

Sed feliĉe mi kunportis la ŝaltigilon, sed esperi ke en tiu vagono de la 19-a jarcento mi trovus konektingon tio estus vera deliro...

Kiom da seniluziiĝo... Nur mi povus fari tion!

Tion mi neniam pardonos al mi!

POEZIO SURBLOGE LOĜAS: PRIPOEZIA INTERNACIA KUNLABOREJO

— Paulo P Nascentes

Demando staras. Ĉu tendenco aperas nuntempe rilate la publikigon de beletraĵoj, pli specife de poezio? Certe indas esplori la temon. Fakto estas, ke krom la tradiciaj publikigejoj, nome libroj, revuoj, almanakoj, magazinoj, periodaĵoj, novaj tiucelaj kanaloj aldoniĝas, ĉu pro la konataj malfacilaĵoj eniri tiun merkaton, ĉu pro la teknologia revolucio, kiu ĉikampe igas eldoniston ĉiu verkisto, kapabla do publikigi kaj disvastigi memstare sian laboron tra la mondo pere de rimedoj de la Interreto. Abundas beletraĵologiaĵoj kaj iliaj kreintoj fariĝas nacie kaj internaciskale konataj, precipe se la verkoj estas dulingvaj. Nialande indas esplori, kiuj estas tiuj aŭtoroj, kiom da

blogoj ekzistas, kiuj furoras, kiuj malaperas. Problemo studinda ankaŭ estas la monrekompenco de tiuj aŭtoroj. Cetere malnova estas tiu problemo, se oni konsideras, ke la pripoeziaj bretoj estas tiuj malpli vizitataj en librovendejoj. Sciate estas, ke multaj libroj iĝas nekodataj dum multa tempo, konsiderante tion, ke beletraĵfakuloj ne plu havas kie publikigi poemojn, nek recenzojn, nek kritikojn en la gazetaro. Jen parto de la malfacilaĵoj, eĉ se novaj malgrandaj eldonejoj ekmarŝas sur tiu densa arbata tereno. Nialande buĝetoj pri kulturo malkreskas. Lamas do la antaŭenigo de tiu kampo, pro absoluta manko de koncernaj politikoj ĉiunivele de nia publika administrado. Kiel alfronti kaj solvi tion? Tiun necesan esploron ni lasu al niaj fakaj junaj talentoj. Pli modeste kelkajn rezistvojojn mi montru. Ili apenaŭ vidiĝas meze tamen al promesplena agadkampo. Tendenco moderna aŭ ne, novaĵo ekaperas en la reta scenejo, nome aŭtoraj beletraĵblogoj, ĝenerale

publikigantaj poemojn, rakontetojn, artikolojn. Pri tiaj blogoj ni okupiĝu en ĉi tiu artikolo celanta konigi al nia publiko kelkajn iniciatojn, eĉ se malkomplete, eĉ se komence. Pliaj samcelaj studaĵoj venu lumen kun pli akurataj kriterioj. Ĝenerale, apud la portugala, Esperanto estas uzata de la plejparto de la blogistoj, kio ebligas kolekti komentariojn de legantoj de diversaj mondopartoj. Ĉi tie ni pritraktu kvar produktemajn aŭtorojn, nome Dirce Sales, Nazaré Laroca,

Paulo Nascentes kaj Paulo Viana, kiuj ekzempligas teamon de obstinaj rezistemuloj. Temas pri kvar blogoj jam de kelkaj jaroj vivantaj, kun kolekto da semajnaj kontribuoj. Por instigi la legantaron de La Lampiro ekkoni aŭ plu ĝui la verkon de tiu kvaropo, mi resume prezentos kelkajn iliajn beletraĵojn. Ne necesas insisti tamen, ke tiu ege modesta prezentaĵo ne anstataŭas la plezuron malkovri la kaŝitajn perlojn inter tiuj, kiuj ĉi tie ekvidiĝos.

Dirce Sales

Sou uma feiticeira disfarçada de gente com nome de Dirce. Moro na Lua Nova e de vez em quando pouso por aqui. Meu feitiço favorito? Inventar contos... encantados - Esperanta traduko “Mi estas sorĉistino ŝajniganta min homo per la nomo Dirce. Mi loĝas en Novluno kaj de tempo al tempo mi venas ĉii tien. Mia preferata sorĉado? Elpensi rakontojn... ravajn.” - Tiel sinprezentas Dirce Sales en *Contos e Encantos da Dirce Sales*. La bonega blogo, tamen, ne estas (ankoraŭ) dulingva. Omaĝe al tiu eblo kaj instige, aŭdace mi esperantigas unu el ŝiaj poemoj. Espereble ĉiu rakonto kaj poemo baldaŭ aperos same esperante. Delikate tekstas la poemo, kies ebla esperantigo povas esti...

PARADOKSOJ

*Via rigardo
min tute nudigas,
en plena hom-amaso...*

*... tamen
mi kovras la nudecon,
kiam ni estas solaj,
unu fojon pli.*

Aparte al mi vere plaĉos esperante povi legi la ceterajn poemojn kaj rakontojn. Staru la defio!

Aŭtoro de *Birda grundo*, la plej ĵusa kaj leginda poezia libro, Nazaré Laroca prizorgas alian beletran ĝardenon, nome la dulingva blogo *Conversando com verso e alguma prosa*.

LOĜEJO

*Mi loĝas en eta korpo,
kiu havas taŭgan pezon,
kaj konvenan mezuron
por enŝipiĝi en tempo,
kaj skulpti mian spacon
en ĉi tiu mondo.*

*Maŝin', pri kiu mi zorgas
cele al ties ĝusta rolo;
lamp', kiun mi lumigas ĝue
por naski la fortunon.*

*Mi havas etan korpon
el akv' kaj sal', el sang' kaj sun';
liturgia vest', frukt' tera,
kiu senŝeliĝos iam
por la teruteron sterki,
kaj liberigi min al Vivo.*

Atendas nin rafinita mistikismo, akurataj versoj, agrabla pejzaĝo. Foje, subtila pesimismo. Jaen plia:

SENTOJ

*En soleco agonias
la silento buŝoŝtopita,
dum dronadas la mondo
en strida galimatio.*

*Nur Dio en silento
aŭdebla nin alparolas;
tamen neniuj sukcesas
aŭskulti la Dian Voĉon.*

Absolute neeble estas aŭskulti la Dian Voĉon dum dronadas la mondo en strida galimatio. Paradokso nin atingas, se kaj kiam venas al nia konscienco, ke necesas akurate silenti por aŭskulti al Si-Mem, kiu estas la Imago Dei, laŭ la saĝaj vortoj de C. G. Jung.

Plurfoje gajninto de meritaj beletraj premioj de UEA en la branĉoj eseoj, originalaj prozo kaj poezio, porinfanaj libroj, Paulo Viana elstaras ankaŭ kiel kompetenta blogisto. Pruvas tion la subaj selektitaj ekzempleroj de abunda beletra produktado. La riĉecon fonetikan, ritman, leksikan kaj de belajn figurojn ni kunĝuu.

TRILO

*trilas sur trono el branĉo kaj folioj
la malĝoja birdo
resonas en la printempa ĉielo
obstina pratempa trilado
de plumplena monarko
krias la brueganta reĝo
oscedas la briza aero
ridas la jasmenujo
falas guto da rezino
sur la solenan kanton
kovras la suverenon
mantelo de melankolio*

La mantelo de melankolio certe kortuŝas nin dum iu interna malĝoja birdo resonas en la printempa ĉielo. Daŭre simila sento rimas kun la fina lamento: la vivo pasis, mi faris kion mi povis.

FOLIOJ

*la horizontala suno antaŭ vespero
bruligas foliojn
jam malfortajn en sia teksaĵo
preskaŭ sensukajn
maldikajn vualojn preskaŭ senutilajn
kiuj baldaŭ faligos sur la grundon
la lumon ilin trapasantan
restas lasta koloro
eta balanciĝado en vento
la vivo pasis
mi faris kion mi povis*

Ĉu konciza prozo, ĉu preciza poezio, decidu mem la leganto. Fine, espero nin vizitas per la suba teksto.

KIAL NE?

Post jaroj sen eĉ unu sola folio, sen ia signo de vivo, unu tagon la persikarbo ekfloris.

Rigardante la novaĵon, en la korto, la posedanto pensis: kial ne ankaŭ mi?

Paulo P Nascentes

Paposnascentes estas la nomo de la blogo. Pri ĉi tiu menciita blagista blogisto prefere mi lasu paroli la poemojn mem. Pri ia mistera naturo de poezio obstine temas pluraj, kvazaŭ pere de tiu multobligo kapablus li sukcese eltrovi la misteron el la poemaj interlinioj. Vane, memkompreneble.

POEZIA PRAGMATISMO

Kun emo al danĝer'

Ŝategas mi ludi

virinojn kaj vortojn.

Se virinojn ludas

serioze ludas – honorvort'!

Se vortojn mi ludas

kiel nun mi ludas

nur ludas al l' cel'

ludadi virinojn – honorvort'!

La tema ligo al la alĥemio, ĝi mem perdita mistero, donas nedifinitan nuancon de neeble trovebla vojo al bona solvo de ajna mistero. Male, despli antaŭeniras la esploro malpli proksima montriĝas la tiom atendita ora aŭroro!

AGAD' ALIIGA

poemoj venas de ie

ege turmentas nin

subhaŭte iu kaŝite

ĉu eble aperos ĝi?

drat' neresponda: poezi'

penante mensogi al vi:

*ĉu leganto, perdas sin,
ĉu poet', la volo scii
la mistero daŭras tiel:
kiel tem' nuda virin'
kaŝ-montrita trezor'
rezulto – nura alĥemi':
en fanduj' de poezi'
nia plumbo iĝas or'*

Daŭras mense ĝis lastmomente neforlasebla de-
mando, kiu pli malproksimen kondukas nin:

ĈU POEZIO NECESAS?

*ĉu poezio necesas, tion diru la leganto,
ne la poeto, ĉar vanto estas malbona elekto
poeto pri sia teksto ne pretekstu
esti mistero: vere plurdimensia
nia Esto ni estas, nesto, kesto
estas koro poezia.*

*ĉu poezio necesas diru Poezio mem,
ne la poeto, tiu sekreto
ŝajnas sfinksa dilemo: deĉifru min
aŭ vin mi voros - la kreemo
de l' poeto ŝvitas tra ĉiuj poroj,
ŝajnas silenta krio, ŝajnas ia senfin'.*

*ĉu poezio necesas?
dum temposparko, kvazaŭ homa fuŝo ĉesas:
jes ĝi tro necesas!
- el kie poemo venas Poezio tie plenas!*

Ne mi tamen respondu tion, ĉu poezio necesas,
precipe prezal!

Referencoj:

LAROCA, M. N. <http://nazarelaroca.blogspot.com/?m=1>

NASCENTES, P. P. <http://paposnascences.com>

SALES, D. <http://contoseencantosdadircsales.blogspot.com>

VIANA, P. S. <http://blogdopauloser-gioviana.blogspot.com>

* Poeto, pedagogo, profesoro pri
Beletro kaj Esperanto.

Granda Fiŝo kaj Begonio

Anna Lobo / Sajjad Dashti Nezhad

Originala nomo: Big Fish and Begonia
Direktoroj/ kreantoj: Xiang Liang, Zang Chun
Tempodaŭro: 1h 45min
Tipo de filmo: dramo/ animacio
Lando: Ĉinio
Lanĉo: 17.08.2018



Ne estas sekreto ke mi ege amas animeojn. Ili estas ege plenaj je kulturo, moralaj valoroj kaj dolĉeco. Sed, tiu intereso ne estas nur mia. Multaj tra la tuta mondo havas tiun saman emon, kaj tial ĉi recenzo estas speciala ĉar estas Brazilo/Irano kunverkado pri animea filmo, kiu rondiras Ĉinan kulturon! Pli internacia ne eblas, ĉu ne? Mi kore dankas al Saĝad, pro tiu ĉi mojosa kunverkado, kaj pro ebleco kundiĉi tiun amon al animeaĵoj.

La etoso de la filmo estas ege simila al tiu de Studio Ghibli. De la unuaj momentoj de la filmo la spektanto eniras en ĝian fantaziecon kaj komencas iom post iom kompreni kiel ĉio funkcias en tiu mondo de la filmo. La filmo ege revigas kaj ravas per siaj koloroj, bildoj kaj imagopovo. Do, la uzata maniero por bildigi la aferojn, tio estas, la koloroj, la scenoj, la desegnaĵoj kaj la muzikoj estas ege unikaj kaj amindaj.

Alia rimarkinda afero pri la filmo estas uzado de simboloj rilate al bestoj kaj naturaj elementoj, kiuj apartenas esence al Ĉina kulturo. Bestoj en la animeo havas gravan simbolan rolon, kiu tre faras la filmon tre interesa. Koni tiun ĉi kulturan simbolan sistemon estos tre agrabla sento por vi.

Du fortaj punktoj en la filmo, kiujn ni eble malofte vidas en aliaj filmoj dum ĉi tiuj jaroj, temas pri rilato inter homaro kaj besto, kaj rilato inter junuloj kaj maljunuloj. En la filmo multege da scenoj temas pri kiel havi maljunan vidpunkton kaj sperton ĉe juna energio kaj amo kaj kiel tiuj ĉi du elementoj kunagas harmonie. La dua afero kiu ankaŭ ege alvokos vian atenton, te-

mas pri forta kaj grava ligo inter homoj kaj bestoj en ĉi tiu animeo, kiu havas multon por instrui al ni.

Aldone, sed ne malpli grava, estas la temo de la filmo. Oni ja perceptas ke ĝia ĉefa temo kiu trairas la tutan historion estas ja pri amo, kaj pli specife pri sindonemo. Pro amo, du el la roluloj pretas preskaŭ je ĉio - eĉ neeblaĵoj. Tia mesaĝo estas ege bela kaj kortuŝa,

ĉefe se oni atentis pri kiom ni iĝas "nesentemaj" kaj nur zorgemaj pri ni mem kaj nia propra bonfarto. Ne nur unu, sed du instigas al ke vi aliru Netflix kaj ĝuu la filmon dum tiuj ĉi jarfinaj festoj! Atentu esti preparita kun tuko aŭ papero apude por sekigi viajn larmojn, kiuj povos tre bone plenigi naĝejon! Bonan spektadon kaj dolĉajn festojn!

ESPERANTISTOJ RENKONTIĜAS EN LA PARAIBA VALO

Je la 18-a de novembro 2018 okazis unu plia entuziasma Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba Valo - regiono inter Rio-de-Ĵaneiro kaj San-Paŭlo, kie situas la viglaj Esperantogrupoj. Ĉi-foje, en la urbo Paraíba do Sul, en ĉambroj de municipa lernejo, sub gvido de Luiz Alberto Coelho, loka veterano. Partoprenis trideko da samideanoj el naŭ urboj. La eventon aŭspicias Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro. En la programo, oni prezentis prelegojn pri "La Origino de Demokratio" (P.S.Viana), pri "La Kvin Fazoj de la Esperanta Literaturo" (F. Pita), pri "Guto da Gramatiko" (P.S.Viana), pri "Investado je Krudaj Varoj" (J. Linck).



Okazis ankaŭ diskutoj pri SAT kaj pri la Esperanta komunumo. Oni prezentis enkondukon de la lingvo al novuloj, pere de lingvaj ludoj (Vitor Mendes). Krome, oni variatis per pluraj kantoj en Esperanto, fare de Miguel Klav, Dirce Sales (kiu lanĉis novan kanzonon originale verkitan en nia lingvo) kaj Tânia Paixão (kiu krome proponis etan pantomimon vestite kiel Chaplin). La tuta etoso estis tre entuziasma.

Dum la evento funkciis eta libroservo kaj budeto de Esperantaĵoj.

(Informas Luiz A. Coelho kaj P.S.Viana)



Ĝenerala eseo pri Okcidentaj Oceaniaj Religioj

V. SZABADI TIBOR J.

Okcidenta Oceanio konsistas el tri etnografiaj lokoj: Mikronezio en nordo, Melanezio sude kaj Aŭstralio en la fora sudo. La ĝenerala scienca interkonsento estas tio, ke ĉi tiuj lokoj estis loĝatigitaj rezulte de migrado el Azio prefere ol el Ameriko. La historiaj devenoj de la plej frua kolonio de la regiono estas necertaj. Estis certe homaj kolonioj en Melanezio kaj Aŭstralio tiom frue kiel antaŭ 40000 jaroj. Mikronezio estis verŝajne antaŭ 3500 jaroj de popoloj de Indonezio, kaj Filipinoj kaj orienta Melanezio.

Mikronezio konsistas el pli ol 600 insuloj kaj insuletoj. Antaŭeŭropana religio estis politeisma. Miriado da diaĵoj personigis malsamajn flankojn de naturo aŭ funkciis kun gardantoj de kultura agado. Mikronezia religio estas karakteriz-vertikala mondrigardo; alivorte, kredo je ĉielo, dioj respondecaj pri la kreo de la mondo kaj asociigo kun la fortoj de la naturo.

Melanezia religio kontraste estas formita per horizontala, prefere ol vertikala kosmologio, estas relative malmultaj ĉielo-dioj; male, diaĵoj emas loĝi en nealireblaj regionoj preter la horizonto. Diversaj ritoj kaj oferoj estis faritaj por pacigi la diaĵojn kaj certigi la protekton kaj prosperon de la grupo. Ankaŭ grava por la religiaj praktikoj de Melanezia estis la spiritoj de la mortintoj kaj Fantomhomoj. Ĉi tiujn oni kredis loĝi inter la vivuloj; la mortintoj devis esti traktataj kun singardemo kaj respekto, ĉar ili havis la povon malpacigi la komunumon.

Aŭstralia Indiĝena religio estas malsama. Ĉe la koro de Aŭstralia Indiĝena religio estas la koncepto de la Revanta. La Revanta estas sankta tempo ĝis vivomemoro, kiam prauloj (en la formo de homoj aŭ bestoj) vagis sur la tero, donis al ĝi formon kaj kreis ĉiujn vivaĵojn el sia propra esenco. La vivo de spirito de homoj devenas

de la prauloj, kaj, sekve, ĉiu homo estas formo de enkorpiĝo de la originaj prauloj. Ĉe morto, la spirito revenos al la prauloj.

Kvankam estas indikoj de ĉielo, diaĵoj ne ludis gravan rolon en Indiĝena religio. La plej grava estas la ritoj, por daŭrigi la ordon en la mondo. Tra la tuta Aŭstralio la ritoj estis faritaj kun la intenco daŭrigi la kosman koheron por certigi la liberigon de la viviga potenco de iu loko. Ĉi tiu kredo je la graveco de loko, kiel la fonto de vivo, ligis la individuon lokon kun la komunumo al iu praula estiĝo.

La vivo kaj kulturo de popolo estis treege transformita pro la alveno de Eŭropaj koloniistoj kaj misiistoj en la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Nelonge antaŭ la fino de la 17-a jarcento Hispanaj Jezuitaj misiistoj laboris en Mikronezio. Tamen ĝis la 19-a jarcento, Protestantismo havis establitan konstantan piedtenejon. La plej grava frua fonto de misioagado estis la interkonfesia Londona Misiista Socio, per kiu Anglikana, Kongregaciisma, Metodista kaj Presbiteriana misioj estis establita tra la tuta Oceanio. Ĉi tiuj estis sekvitaj en la dua duono de la 19-a jarcento de Metodistoj, Luteranoj kaj la Nederlanda Reform-preĝejo, kaj poste de Usonaj Mormonoj kaj misiistoj de Adventistoj de la sepa tago.

En 1788 la unua aro de kolonianoj alvenis en Aŭstralion. Kun Eŭropa koloniigo venis malsano, konkero kaj la amasmortigo de granda parto de la Indiĝena loĝantaro de sudorienta

Aŭstralio. Malamikeco al Eŭropanoj esprimis sin en kelkaj vojoj. Unu estis la stablo de jarmila ribelo, kiu batalis kontraŭ la tuj okazonta foriro de Eŭropanoj kaj la reveno al la originalaj indiĝenaj tradicioj.

Post la kvietigo de la Indiĝenaj aŭstralianoj kaj ilia integriĝo en la Eŭropa ekonomia ordo, indiĝena religia esprimo venis al karakteriza aspiro por ekonomia egaleco kun blankaj Eŭropanoj. Ĉi tiun fenomenon oni nomis kargoismo kaj ĝi prezentis la kredon, ke la akiro de varoj kontribuas al la liberigo de subpremo al indiĝena gento per havigo de materia riĉeco. Fine, diversaj apartaj formoj de Indiĝena Kristanismo evoluis en la 20-a jarcento. Foje ĉi tiuj prezentis duoblan kosmologion, en kiu tradicia indiĝena kredaro staras apud Kristana kredaro; foje, Kristanismo estas sinkretismigita kun Indiĝena kredo; pli lastatempe indiĝenaj preĝejoj klare establas, ke la fonto estas la Indiĝena Evangelia Kunuleco.

La religia historio de Melanezio kaj Mikronezio havas similan manieron. Eŭropa koloniado kunportis malsanon, konflikton kaj senpopoligon. En Aŭstralio kelkaj jarmilaj movadoj baldaŭ ĉesis, kredante, ke la malnova ordo baldaŭ estos reestablitita. Frua ekzemplo de ĉi tiu estas la Tuka Movado kiu estiĝis nelonge antaŭ la fino de la 19-a jarcento en Fiĝio. Gvidita de Fijia pastro ĝia nomo estis Ndugomoi; la movado anoncis la tuj okazontan revenon de la prauloj kaj la foriron de blankaj kolonianoj.

Precipe grava ekzemplo de indiĝena ŝanĝo pro la ĉeesto de Eŭropanoj estis kargoismo. La diversaj kargomovadoj kombinis kontraŭeŭropan agiton kun la kredo, ke la akiro de materiaj varoj kaj la interveno de prauloj aŭ Jesuo devus liberigi ilin de ilia kondiĉo de subpremo. La plej bona sciata frua kargomovado estas la tiel nomita Vailala frenezo kiu enradikiĝis en Papuo-Nov-Gvineo en 1917, kaj kiu kunmiksas Kristanan kredaron kun la atendo de la alveno de kargoŝipo ŝarĝita per varoj kaj homekipita de la prauloj. Aliaj similaj movadoj estas la Mambu-movado de Nov-Gvineo, kiu provis deturni kargon de Eŭropaj riĉaj homoj, kaj la Jon Frum-movado de la Nov-Hebriidoj (nun Vanuato) kiu, kiel la nomo sugestas, baziĝas je la kredo pri mesianisma nomo Jon Frum kiu volis reveni al la Tero kaj riĉigi sian sekvantaron per abunda riĉeco.

Kreskante el la kargosektoj estas kelkaj sendependaj preĝejoj. Ĉi tiuj emas kombini la gvidantaron de karismo, kiuj estas foje atribuita al dia aŭ kvazaŭdia statuso, kaj kargoisto kaj jarmilaj atendoj. Du tielaj ekzemploj estas la Yali Movado kaj la Peli Asocio. La nomo devenas de ĝia fondinto Yali Singa, al kiu oni atribuas respondon al Jesuo. Tiu ĉi lasta, ankaŭ akiranta sian nomon de sia fondinto, Matias Yaliwan, akiris grandan sekvon en Papuo-Nov-Gvineo(5) per promeso al sia sekvantaro pri la mirakla kondiĉo de kargo. Ambaŭ movadoj ekzistas nuntempe kaj atestas viglan kaj klaran formon de religia esprimo en la regiono. Aliaj tutmondaj religioj estas kiuj ekzistas en tre malgrandaj nombroj rezulte de elmigrado de Eŭropo, Azio kaj Sud-Orienta Azio.



Bianca

(tradukado)

Tradukisto: Cristina Graaf

Kun la pezo de ŝiaj valizoj, Bianca rapidas tra la stacidomo. Laca kaj spireganta, ŝi trenas la grandegan pakaĵon. Inter laŭtparoliloj kaj puŝoj, en la kontraŭirado, la junulino celas sian platformon. Bianca trenas siajn valizojn kaj siajn zorgojn, siajn mem-postulojn. Ŝi alfrontas la homamason kun la kuraĝo de tiuj, kiuj alfrontas la mondon kaj serĉas sian vagonon kiel astmulo deziras la oksigenon kaj la pacon. Bianca trenas sian grandegan pakaĵon kaj sin trenas.

La trouzita agendo pezas en ŝia sako, kaj en la valizo la privata taglibro portas la ŝoseon, la platformon, la homamason en kontraŭa irado, la puŝojn kaj la pezon de la literoj. Bianca sentas la pezon de sia ĉarma robo el ŝifono kaj la nemezureblan doloron de komfortaj ŝuoj.

Konsistanta el fazoj, homoj, sentoj, konceptoj, paĝoj kaj inko, Bianca, kun sia kapo turnita malsupren, trenas siajn posedaĵojn kaj, meze de ĉi tiu malespero, forgesas la eksteron. Bianca pensas pri siaj gepatroj kaj saŭdado, pri la perditaj amoj, pri la malfortaj amikecoj, pri la parazitaj kiuj ŝin ĉirkaŭas, kaj ŝi malhavas la aeron, kiun ŝi neniam posedis, sed nur hodiaŭ ŝi povis senti, ke ĝi mankas.

Meze de tiu interna vortico, la mondo de Bianca turniĝis kaj la homamaso fariĝis pli rapida kaj pli feroca. Per forta batpuŝado, sekvita de ofendoj, la junulino perdas sian pakaĵon, kiu iras al la trakoj de la trajno kaj, antaŭ ol ŝia voĉo neniam uzata povus eĥigi krimon por helpo, ĉio, kion ŝi portis en



siaj maldikaj brakoj, frakasiĝis sub la rapida vagono plena je paco kaj oksigeno.

Bianca ĉiam estis certa pri la vagono, kiu forportis la bruon de la homamaso, silentigis la laŭtparolilojn, kaj per perforta kraŝo, detruis la pezon kiun ŝi eltenis sur la ŝultroj. Lasante la brizon de oksigeno kaj la silenton de paco.

Bianca neniam eniris en tiun vagonon. Ŝi rimarkis, ke ŝi ne bezonas sekvi la homamason aŭ porti tiun pezon. La bela junulino en sia malpeza ŝifona vesto kaj komfortaj ŝuoj eliris en la nokton de la urbo, sub la luno, preta por vivi.

La dimensioj de la Universo kaj la Homa Menso

Nia percepto influata de nia kalkulkapablo

— Guilheme Jardim

Nia origino en la naturo

Ni ĉiuj scias ke ni komencis nian vojon en la naturmedio antaŭ milionoj da jaroj. Dum tiu epoko nia rilato kun la bestoj, homoj, objektoj de la ĉirkaŭaĵo permesis al ni disvolvi la kalkulkapablon sed tiu kalkulkapablo estis, kompreneble, limigita de la kvantoj kiujn ni trovis ĉirkaŭ ni. Ni sciis kalkuli ĝis dek. Sekve, post dek ne venis dek unu sed venis “multaj”.

Ne estis necesa la numero nulo aŭ pli da kvantoj por kalkuli niajn parencojn, niajn bestojn aŭ niajn manĝaĵojn. Tio estas memkomprenebla kaj logika. Iom post iom nia vivokomplekseco pligrandiĝis, civilizacio disvolviĝis, nia kalkulkapablo plilarĝiĝis ĝis la mirinda disvolviĝo de matematiko moderna.

La progreso de la scienco

En la moderna epoko la scienco malfermis pandoran skatolon de mirindaĵoj antaŭ niaj okuloj. La nova universo venas kune kun aliaj dimensioj, miliardoj, bilionoj. Ĉu vere ni povas aserti ke ni kapablas kompreni tiajn grandecojn, tiajn kvantojn?: Ĉu vi scias diri kio estas 200 miliardoj da steloj en nia galaksio Lakta Vojo? Ĉu vi povas imagi tiom da steloj? Mi povas helpi vin dirante ke sur unu plaĝo kiel “Praia Grande” en la urbo Santos, en Brazilo, estas 200 miliardoj da sableroj, do unu sablero de la plaĝo respondas al unu stelo de nia galaksio.

Se nia sunsistemo estus je la grandeco de unu KD, muzikdisko, kiu estus la grandeco de nia galaksio, Lakta Vojo? KREDU MIN, la grandeco de Brazilo. Vere nekomprenebla kvanto kaj grandeco por nia limiga menso de kavernuloj. Kaj la dimensioj ne haltas tie. La sciencistoj krome diras ke estas 200 miliardoj da galaksioj en nia universo videbla. Post tio nia cerbo bankrotis kaj rezignis kompreni tian ampleksecon. Ni ja estas simioj kiuj nur komprenas limigitajn kvantojn.

Nia filozofio kaj nia kalkulkapablo

Ne hazarde ni kredas ke Dio estas nur unu, ke ni estas la sola filo de Dio en la universo kaj eĉ ke Dio vivis inter ni dum 33 jaroj. La kvantoj estas vere limigitaj en nia filozofio aŭ religio. Nenio pri miliardoj da filoj, aŭ bilionoj da jaroj. Dio kreis la mondon, vidu, unu mondon, dum ses tagoj, ne dum miliardoj da tagoj, por ne diri ke Li ripozis en la sepa tago. Kial ni ne konceptas senfinan kvanton da mondoj, enloĝataj de miliardoj da civilizoj, aliaj filoj de Dio? Ĉar por ni pli ol dek estas multaj. Ĉio, kion ni kredas, konscias aŭ per-

ceptas estas rekte dependanta de nia kalkulkapablo. La kvantoj kaj dimensioj de nia Universo estas multe pli ampleksaj ol niaj kapabloj povas atingi kaj sekve niaj konceptoj estas vere limigitaj kaj ne ĝustaj. Kaj ĉu vi kredas ke sufiĉas por la scienco tiaj kvantoj nuntempaj? Tute ne. Modernaj teorioj alvenas pri la multiverso, jes ja, nia universo, grandega, ne kalkulebla por ni, ne estas la sola universo kreita. Ĉu ni kapablos koncepti tiajn kvantojn? Ĉu ni kapablos ŝanĝi nian limigitan filozofion aŭ limigitajn religiojn?

EL LA VIVO DE FAJROBRIGADISTO

MI VOLAS ESTI SUBAKVISTO

Alencar Esmeraldo

Kiam mi ĉesigis fumadon, mi pensis: “mi volas esti subakvisto”.

Mi atendis malfermon de kurso por ke mi aliĝu por fari la lecionon kaj fariĝu subakvisto.

Malfermiĝis la kurso kaj mi aliĝis, poste mi estis anksia por komenci ĝin, mi kalkulis per la fingroj la tagojn por komenci.

Do, je la 15-a de oktobro 1992, fine komenciĝis la kurso kaj mi kun miaj amikoj nin prezentis en la kazino, kun uniformo por kurso: banokalsono, ĉemizeto, tenisŝuo kaj blankaj ŝtrumpetoj.

Ni organizis nin kiel taĉmento, laŭ duoblaj vicoj, en la sportejo, kaj la kurso komenciĝis.

Ĉar ĝi estas kurso kaj oni devas havi korpan reziston, tial la Instruisto, leŭtenanto Monford kun kaporalo Cardoso tuj komencis prepari nin.

Unue ni ĉirkaŭkuris dufoje la sportejon, poste ni haltis kaj restis en duobla vico. Unu post alia, la instruisto ordonis, ke ni restu kun la mano sur la planko, kun etendita brako, kaj kruroj kun la abdomeno malsupren turnitaj kaj ni komencis fari brakajn movojn. Ni faris tion kvardek fojojn. Mi pensis: “ĉi tio ne estas facila, en kian defion mi enŝoviĝis...”

Tiam mi pensis denove: “mi volas, do mi sukcesos, kial ne?”

Ĉi tiu estis la bona parto. Post kiam mi kompletigis la brakmovojn, ni ko-

mencis kuri, ni saltis malfermante kaj refermante la brakojn kaj kruojn, frapante unu manon kontraŭ la alian super la kapo, poste ni kuris ĉirkaŭ dek kilometrojn, kiel preparon por enveni en naĝejon.

Nu, ni alvenis en naĝejo, kaj ni denove devis plenumi korpekzercojn.

Ni estis dek kvin lernantoj, ĉiuj estis lacaj, kaj la instruisto ekkompatis nin, kaj donis al ni dek minutojn por ripozi, ni diris “dankon, instruisto!”. Sed baldaŭ ni devis reveni al pliaj korpekzercoj.

La ekzercoj nun okazis en la akvo, en la naĝejo.

Ni komencis naĝi, ni naĝis 400 metrojn laŭ brusta stilo, kaj ni ripozis 5 kvin minutojn. Poste ni naĝis 200 metrojn laŭ klasika stilo, kaj ni ripozis 5 kvin minutojn. Poste ni naĝis 300 metrojn laŭ stilo nomata “laca naĝanto”.

Ni estis tre lacaj, ni petis de la instruisto iom pli grandan ripoztempon. Li ridis kaj diris: “ĉi tio celas, ke vi lernu ke obeo estas oro”. Kaj li donis 30 tridek minutojn por ripozi.

Post tiu ripozo ni rekomencis ekzerciĝadon en la naĝejo, en ĉi tiu tago ni naĝis ĉirkaŭ 4 horojn.

Kiam ni estis en la naĝejo, la instruisto diris, ke ni revenos al la kazino per venturilo.

Kaj tiel oni faris. Ni eniris venturilon kaj iris al la kazino, ĉiuj estis lacaj, ne povis paroli, ni rigardis unu alian, kaj la okuloj diris tion, kion ne volis diri, ni estis elĉerpitaj.

La revenvojaĝo estis pli longa ol la aliro al la naĝejo.

Fine ni alvenis, kaj ni iris manĝi, poste

purigi kaj ordigi nian materialon.

Ĉar en kazino oni havas disciplinon, ni staris en duoblaj vicoj, apud la manĝejo, por atendi, ke la instruisto rajtigu al ni envenon por manĝo.

La instruisto rajtigis nian eniradon, kaj ni manĝis.

Ĉi tiun tagon mi manĝis kiel neniam mi manĝis, mi repetis 3-foje la manĝon.

Poste, la instruisto liberigis nin por foriri hejmen.

Mi ne havis aŭtomobilon, do mi iris per aŭtobuso, kaj mi suferis por supreniri la ŝtupareton al la buso. Mi sidiĝis, mi veturis hejmen, tio daŭris ĉirkaŭ 30 minutojn. Por eliri el la buso, la ŝoforo preskaŭ devis puŝi min for.

Tre suferi kaj piedirante tre malrapide mi alvenis mian hejmon lacega, draŝita, molaĉa, lamanta.

Mi alvenis je la dekkvina horo, mi iris rekte al la lito, kaj mia edzino venis paroli kun mi, sed mi estis tiel laca, ke mi preskaŭ ne sukcesis respondi al ŝi.

Mi dormis tri horojn kaj mia edzino vekis min por la vespermanĝo.

Mi ellitiĝis kaj mi venis al la kuirejo por manĝi. Mi manĝis iom dormetante, kaj tuj revenis al la lito por dormi ĝis la sesa matene.

Mi ellitiĝis, min banis, brosis la dentojn, min razis. Kaj mi revenis al la kazino por daŭrigi la kurson de subakvito.

Kiam ni alvenis la kazernon, instruisto staris en la sportejo, kaj ni envenis, ni rekomencis la korpekzercojn per brakmovo, tridekfoje...

LINGVAJ RESPONDOJ DE FRANCISCO WECHSLER

Demando

Oni ofte legas: *Kiom bela estas la hundo! Kiom eleganta fraŭlino!
Kiom forta atleto!*
Ĉu tiuj frazoj estas ĝustaj?

Respondo

La tabelvortoj *kiel* kaj *tiel* esprimas, interalie, gradon de adjektivo. Kompare, la tabelvortoj *kiom* kaj *tiom* indikas kvanton kaj ordinare ne estu uzataj ĉe adjektivo (tamen vidu kelkajn esceptojn ĉi-sekve). Do jen la rekomendindaj formoj, kiuj sekvas la *Fundamenton* kaj la verkojn de Zamenhof: ***Kiel*** bela estas la hundo! ***Kiel*** eleganta fraŭlino! ***Kiel*** forta atleto!

Vidu pliajn ekzemplojn pri grado:

[...] tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, ***kiel*** granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [...]

 (FE)

Kia majstra kreitaĵo estas la homo! [...] ***kiel*** granda kaj mirinda per sia formo kaj movoj! (H)

Kiel grandaj estas Viaj faroj, ho Eternulo! (MT)

Notu, ke Zamenhof kaj Kabe uzis *kiel* apud adjektivo ankaŭ por demandoj, ĉu rektaj aŭ nerektaj, kiuj postulas kvantan respondon:

Mezuri Jerusalemon, por vidi, ***kiel*** larĝa kaj ***kiel*** longa ĝi estas. (MT)

Jes, se vi povas diri al mi precize [...] ***kiel*** profunda estas la strata defluilo sur tiu strato, ĉe kiu troviĝas via lernejo? (FA 2)

— Por ***kiel*** longa tempo la princo deziras dek kvin talentojn? —

demandis li. (F)

Eble vi emus uzi *kiom* en la ĉi-supraj frazoj. Simile, ĉe demandoj, kiam klare estas atendata respondo pri kvanto, vi emus uzi *kiom*: — ***Kiom*** alta estas la domo? — Ĝi havas kvar metrojn da alto. Tamen atentu, ke tiu ĉi uzado ne konformas al la klasika, tial anstataŭe demandu: — ***Kiel*** alta ŝi estas?

Iafoje Zamenhof escepte uzis *kiom* kaj *tiom* ĉe adjektivoj, ĉiam por emfazi gradon:

[...] ***kiom*** ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per refarado de la karto [...] (P)

La propagando de Esperanto, ***kiom*** ajn grandaj estas ĝiaj lastaj progresoj, estas apenaŭ komencata. (LZ)

[...] Inter la esperantistoj vi trovos multe da homoj ***tiom*** neinstruitaj, ke [...] (EE)

La Esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion ***tiom*** perfektan, ke nenio pli alta jam povus ekzisti. (EE)

[...] kaj mi volas tian edzon, kiu [...] estus ***tiom*** plena de konfido al mi, [...] ke li sen maltrankvileco povus min vidi en la mezo de tridek viroj. (GD)

Kiel asertas *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, oni devas uzi *kiom* kaj *tiom* en tiaj okazoj ne rutine, sed nur por emfazi gradon, ĉar alie oni perdos la distingon inter grado kaj kvanto.

Mallongigoj

F: *La Faraono*; EE: *Esenco kaj Estonteco de la Lingvo Internacia*; FA: *Fabeloj de Andersen*; FE: *Fundamento de Esperanto*; GD: *Georgo Dandin*; H: *Hamleto*; LZ: *Leteroj de Zamenhof*; MT: *Malnova Testamento*; P: *Post la Granda Milito*

LA PRUDENTO NE REĜAS, TAMEN ĜI REGAS

José Mauro Progiante

Kiom da fojoj vi ekmalfermis vian buŝon por diri ion, sed diris nenion? Kiom da fojoj vi skribis mesaĝon en via komputilo aŭ en via poŝtelefono kaj, kiam via fingro estis ektuŝonta la butonon “sendi”, vi rezignis kaj forviŝis la tekston? Kiom da fojoj, stirante vian aŭtomobilon malantaŭ kamiono, en dudirekta aŭtovojo, vi decidis transpasi ĝin kaj lastmomente demetis la piedon de la akcelilo kaj atendis pli favoran momenton por la transpaso? Al mi tiaj situacioj estas oftaj.

Tio okazas ĉar ni ĉiuj posedas, en pli aŭ malpli alta grado, virton nomatan prudento, kiu funkcias kiel gvidilo de niaj agoj kaj eĉ de niaj aliaj virtoj. Danke al ĝi ni kapablas taksi la konsekvencojn de niaj diroj kaj faroj. Ĝi apartenas al parto de la etiko kiu pritraktas la homan respondecon.

La filozofoj diras, ke multaj virtoj estas superaj al la prudento, ekzemple la amo kaj la justeco. Tamen ili rimarkas, ke sen la prudento la aliaj virtoj estas mankaj. La kuraĝo estas rigardata kiel unu el la plej gravaj virtoj, eble ĝi estas la plej admirata. Malgraŭ tio, la kuraĝo povas iĝi noca, se la kuraĝulo agas sen prudento, trorskeme. La amo, sen la prudento, estas blinda kaj nesufiĉa. Patrina amo nur garantias bonstaton al la filo se ŝi

scias kiel zorgi lin. Kaj la prudento estas ĝuste tiu inteligenteco, tiu kapablo percepti la farendaĵojn kaj agi por la bono. André Comte-Sponville diras, ke la homa prudento ekvivalentas al la instinkto de la bestoj. Ĝi estas praktika saĝeco, kiu montras kaj lumigas la vojon sur kiu la virta homo iras kun sia ŝarĝo da idealoj. Prudenta homo atentigas pri la estanteco, sed ankaŭ pri la estonteco.

Do la prudento estas multe pli ol singardemo. Ĝi ja utilas por eviti danĝerojn, tamen ĝia pleja graveco kuŝas en tio, ke ĝi ebligas al la homo fari la ĝustajn juĝojn por apliki siajn moralajn principojn.

Kiam vi ekmalfermos la buŝon por paroli ion, kiam vi estos tuŝonta la butonon “sendi”, kiam vi estos decidanta transpasi kamionon, aŭ en iu ajn situacio, en kiu via diro aŭ via faro povos esti gravaj konsekvencojn, estu respondeca, tio estas, uzu la prudenton. Tiu nemalhavebla virto rilatas kaj al via pasinteco, ĉar ĝi evoluis en vi per viaj antaŭaj eraroj, kaj al via estonteco, kiu dependas grandparte de viaj nunaj elektoj.

Kelkaj poeziaj pripensoj

Maria Nazaré Laroca

Mi ŝatas la klasikan difinon de Poezio faritan de la brita romantika poeto William Wordsworth: “Poezio estas emocio kolektita en trankvileco.” Do ĝi subite trafas la poetkoron konektitan je unika magia momento, sed ĝia nasko okazos poste, en ripozo. Tiamaniere Poezio ekstarigas en miaj bruaj silentoj kaj (mal)kvietecoj, en la fluo de la ĉiutagaj ĝojoj kaj doloroj. Sed fakte sur la spuroj de l’ tempo la Poezio trapasas mian vivon kaj emociojn, kiel rivero teksata de lingvaĵo, kiu igas min senti la pensojn kaj pripensojn la sentojn.

Kaj la poemoj pluiras sur sia (mia) transiro. Kaj foje mi senvualigas min tiel, kiel oni legas el interlinioj de mia dulingva poemeto nome, *Figuro _ Figura*: <https://nazarelaroca.blogspot.com/2017/08/figura-figuro.html>

Figura

Talvez eu seja
o avesso da imagem
que teu olho capta:
metáfora...
ou metonímia
de mim: eu
que transgrido
na fímbria poética
do inefável.

Figuro

Eble mi estas
la reverso de la bildo,
kiun kaptas via okulo:
metafor’ aŭ metonimio
pri mi: ribelema
ĉe l’ rando poezia
de l’ neesprimeblo.

Mi finas ĉi tiujn senpretendajn vortojn per brilaj asertoj. Laŭ la grava islanda poeto Baldur Ragnarsson, poezio estas esploro:

“— Por mi poezio estas esploro kaj maniero kapti la disfluantan senton, por ĝin fiksi en spaco kaj tempo. Ofte tiu esploro ŝajnas egali kreon, sed efektive ĝi ĉiam

estas trovo de io ekzistanta, sed antaŭe ne konita aŭ nespertita aŭ nerimarkita.

Tiun ion la poezio esploro sentebbligas, neŝajnigas, enfaktigas. Kutime tion ebligas al la poeto metafora uzo de la lingvo, sed okaze ankaŭ la strukturo de la lingvo.

Oni povas konsideri tion avantaĝo, ke la Esperanta poeto havas je sia dispono lingvon, kies vortfaradaj (ja strukturaj) kapabloj probable estas unike dinamikaj inter lingvoj; kaj sekve esplorpotencaj.” (El *Esploroj; poemoj*: Anstataŭ prologo”. Baldur Ragnarsson. La Laguna: J. Ré-gulo.1973)

“Ha, Karmela!”

P. S. Viana

de José Sanchis Sinistera.


El la hispana lingvo Esperantigis Miguel Fernández.

Eldonis Asociación Izquierda y Esperanto - SATeH - 2018.

En la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono (2018), Miguel Fernández prezentis en “Aŭtora Duonhoro” sian tradukon de ĉi tiu interesa teatraĵo. Ĝi tiel vekis mian scivolemon, ke mi tuj rapidis al la libroservo por aĉeti mian ekzemplon. Mi ne pentis.

“Ha, Karmela!” estas politika libro. Tamen, sendepende de tio, ke ĝi estas “maldekstrula” verko, ĝi meritas legadon fare de ĉiu homo, kiu revas pri pli justa kaj homama mondo. Ĝi ne pledas specife por tiu aŭ alia politika tendenco, sed simple por iu pli digne homa mondo. Kontraŭ perforto, kontraŭ krueleco, kontraŭ malaltigo de la homeco.

La intrigo estas simpla sed tre interesa - kaj “komike tragika”. Paro da popolaj aktoroj, Paŭleno kaj Karmela - estas invititaj de la militistoj de Francisco Franco, okaze de la civila milito en Hispanujo, por prezenti teatraĵon omaĝe al tiu reĝimo. Devige ĉeestos la spektaklon ankaŭ




militkaptitoj de la kontraŭa flanko, nome soldatoj el pluraj landoj de la mondo, kiuj volontule sin prezentis por batali kontraŭ la fortoj de Franco. Ĉi tiujn kaptitojn oni ekzekutos en la sekvonta tago! Sed en la fino de la dramo, Karmela alprenas surprizajn sintenojn...

La dramo okazas en du aktoj kaj epilogo. Ĝi komenciĝas naive, evoluas al komikeco, poste al kruda pikaresko kaj fine al kortuŝa tragiko. Evidentiĝas protesto kontraŭ diktatoreco, fanatikeco kaj milito. Elstaras la ideo, ke patriotismo estas tute relativa koncepto. La homaj figuroj de Paŭleno kaj Karmela delikate reprezentas la animon de popolo, kiu simple emas vivi sian vivon pace, laŭ sia natura

inklino kaj siaj tradicioj, preter la fremdaj ordonoj de sintrudaj aŭtoritatuloj.

La traduko estas flua, natura, vigla kaj sentoplana. Kompetigas la tekston multaj piedpaĝaj notoj, kiuj helpas la komprenon de la historiaj situacioj. Krome, Miguel Fernández malfermis la volumeton per riĉenhava enkonduko, kiu perfekte informas al la leganto la cirkonstancojn de la verko.

Jen valora legaĵo, por kiu mi dankas la eldonistojn kaj la tradukiston. Kaj precipe al nia mirinda lingvo Esperanto, ĉar en la portugala lingvo mi probable neniam legus ĝin.



Titolo: La nigra birdo kaj aliaj rakontoj

Verkisto: Paulo Sérgio Viana

Paĝoj: 124

Pezo: 182 g

Prezo: R\$20,00

ALE KAJ VOJAĜO



- 01- Kie oni aŭdas la flutojn?
- 02- Rajdu sur la luma ĉeval'
- 03- Ĵoker'
- 04- Tempo modernaj
- 05- Sekretaj formoj de plezur'
- 06- Raŭkaj krioj de la ver'
- 07- Spiro el perdita koro
- 08- Tro
- 09- La du hundoj
- 10- Simplaj vortoj
- 11- Diri
- 12- Floroj de la kosma ĝarden'
- 13- Simplaj vortoj (versio de Ĵomart kaj Nataŝa)
- 14- Malproksimaj limoj

12 Januaro 2019

La 10 originalaj kantoj de Ale el la 14a titoloj en ĉi tiu bita albumo estis verkitaj en la brazila kamparo, en regiono kie abundas akvofaloj kaj montoj, kaj, laŭ onidiroj, la eksterteranoj ŝatas parki siajn kosmoŝipojn. Krome, menciindas ke la verkado okazis en la esperanta bieno Bona Espero, kie ekde la jaro 1957 esperantistoj edukas kaj protektas infanojn kies familioj ne sukcesas ilin prizorgi.

TRO

Aĉetebla ĉe www.vinilkosmo-mp3.com

BEL-Konferencoj - 2019 -

Pouso Alegre | 19-20 Aprilo

Centro Cultural Cleonice Bonillo Fernandes
Praça Senador José Bento, 2 - Centro Pouso
Alegre - MG - Brazilo

Organizas:

Esperanta Ambassadejo
Rua Prof. Inácio Loyola Pres, 81
Centro, Pouso Alegre - MG
www.linguainternacional.pe.hu



Aŭspicias:



Brazilo Esperanto-Ligo



Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro